

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Joachim Gießner

1. La luno jam leviĝis,
steletoj ekheliĝis,
ravante homojn nin.
Silentas la arbaro
kaj super la kamparo
nebul' pala levas sin.

2. Neniu vento blovas,
la mond' ne plu sin movas
sub paca, klara lun'.
Nun petu noktan benon,
de l'tago la ĉagrenon
dormantaj vi forgesu nun.

3. Jen luno sur ĉielo
en brila ronda belo
duon-videbla nur.⁴
Ĉar multon ni ne vidas,
ni ofte ĝin priridas,
malsaĝe juĝas kun plezur'.

4.
.....
.....
.....
.....

5.
.....
.....
.....
.....

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Adolf Burkhardt

1. Leviĝas luno; hele
orpompas surĉiele
la steloj al l'okul'.
Arbaro mute revas;
el la herbej' sin levas
mirinde blanka la nebul'

2. Ripozas mont' kaj valo
sub la krepusk-vualo
trankvile kvazaŭ lag'.
Por vi jen la permeso
fordormi en forgeso
la malbonaĵojn de la tag'.

3. La luno nur duone
Prezentas sin impone;
ĝi tamen estas sfer':
Facile ni priridas
aferon, se ni vidas
nur parton de la plena ver'.

4. Homidoj ni fieraj
pekuloj nur, mizeraj;
ne multon scias ni.
Ni teksas iluziojn
kaj serĉas multajn sciojn
kaj devojiĝas pli kaj pli.

5. Ho Di', nin lasu vidi
la Savon, ne plu fidi
vantaĵojn de l' pasem'!
Nin faru simpl-animaj,
infane Dio-timaj
en ĝoj', jam nun sen zorga trem'!

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

1. La luno nun leviĝis,
La steloj eklumiĝis,
Subiĝis jam la sun'.
Silentas la arbaro
Kaj super la kamparo
Nebulo blanka kuŝas nun.

2. La mondo ŝajnas kiel
Hejmeca ĉambro, tiel
Trankvila estas ĝi.
Dormante ĉiun penon,
Aflikton kaj ĉagrenon
Dum nokta hor' forgesu vi.³

3.) Jen staras ĉe l' ĉielo
Tre eta fora stelo,
Sed tamen egas ĝi!
Ja estas ofte aĵo
Por ni nur ridindaĵo;
Ĉar ne videblas ĝi al ni.

4.) Ni homaj fieruloj,
Mizeraj ni pekuloj,
Malmulton scias ni!
Ni faras multajn aĵojn
Kaj artajn elpensajojn,
Sed vana estas tio ĉi.

5.) La Dian savon vidu
Ni nur kaj ni ne fidu
je vanta iluzi'!
Ni malfieraj iĝu,
Ni ĝoju kaj piigu,
Infan-egalaj estu ni!

...

³alia versio:

2.) Ah, kiel trankvileca
La mondo kaj hejmeca
Vespere estas ĝi!
En tiu kalma paco
Ekdormu vi pro laco,
Forgesu la aflikton vi!

⁴S-ro Gießner unue tajpis:
duona tamen nur.

6.

6. Vi fine, sen ĉagreni,
 el mond' nin volu preni
 per milda morto for.
 Nin tiam al ĉielo
 venigu, al la celo:
 Vi, nia Dio kaj Sinjor'!

6.) Finfine vi nin prenu
 El tiu mond', ĉagrenu
 Ni ne pro tio ĉi!
 Kaj kiam vi nin prenos,
 Ho faru, ke ni venos
 En vian regnon, kara Di'!

7. Ĉe l'fino de la tago
 kuŝigu vin sen plago,
 silentas la anim'.
 Ne punu nian faron,
 sed nin kaj la najbaron
 dormigu, Dio, nun sem tim'.

7. Gefratoj, nun ekkusu!
 Vin nokta vent' ne tuŝu,
 dum ŝirmas anĝelar'.
 Indulgu, Di', nin grace,
 por ke nun dormu pace
 ni kaj malsana la najbar'.

7.) Gefratoj, enlitiĝu,
 Trankvile endormiĝu!
 Noktiĝas ĉie ĉi;
 Vin gardos nia Dio.
 Li regas super ĉio.
 Ĝis morgaŭ nun ripozu vi!

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de ADOLF BURKHARDT (pastro, *1929-04-10 - †2004-04-02).*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1989-09-10.*

Arg-394-782 (2007-03-28
 09:55:34)

Arg-394-780 (2007-03-27 19:07:21)

MR-013-2 / Arg-394-777
 (2007-03-26 13:19:45)

Mi, Manfred Retzlaff, detajpis tiun tradukon de Joachim Gießner el folio kun letero, kiun skribis al mi en 1987-11-24 s-ro Joachim Gießner. Li skribis en tiu letero, ke la fakto, ke lia traduko de la unua strofo estas tute la sama kiel en tiu de Otto Bonte, estas hazardo kaj ke li ne sciis antaŭe la tradukon de Otto Bonte.

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la kant-libreto "Mia kantaro I", dua eldono de Majo 1998, kompilita kaj eldonita de s-ro Josef Schiffer, Wilstorferstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio. Sinjoro Josef Schiffer donis al mi la permeson.

Tiu ĉi traduko estas unue publikigita en 1984 en "Esperanto aktuell", numero 6/1984, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", paĝo 15. Enigis ka tekston de la traduko la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen. Mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis en 2007-03-26 nur la duan strofon, kompare al la teksto aperinta en "Esperanto aktuell 6/1984".